

POPOLAJA FRONTO

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

EKSTER NIA VOLO, NENION!

Tro facile falis en eraron tiuj, kiuj supozis, ke pro kunveno en Parizo de kelkaj histrionoj, oni povus haki fuŝan solvon al la hispana konflikto, ekster la volo aŭ la konvinko de la hispanoj. Laŭ plej diversaj manieroj, la legitima Registaro solene deklaris, ke la paco venos rapide tuj post foriro de la invadintaj soldatoj, kiujn, po dekmiloj, Italio k Germanio liveris al la ĉefperfidulo Franko. Nur tiam, ne pli frue! Ĉiu ajn alia propono, sen atento al tia principo, ne estas solvo sed plia komplikajo. La pedantaj —aŭ perfidemaj— ĉefministroj de Britio k Francio povas ja ie kunveni por prilabori la pilolon de nia kapitulaco; sed certe ili neniam povos trudisian kontrabandon al la hispana Respubliko, kiu gardostaras kun armeo el kvincent mil kuraĝaj viroj k veteranaj soldatoj. Krom tio, oportunas forviŝi ŝablonan famon, ankoraŭ nun gvidanta ĉe multege da kapoj: La potenco de la nunaj regantoj de Britio k Francio neniel estas senlima; tial estas tre absurde dedukti, ke ili kapablas fari k malfari ŝanĝojn, laŭ propra kaprico, en la kripla fizionomio de Eŭropo. Ne, tute ne! La komploto de München sukcesis pro efiko de la surprizo aŭ pro la krima konsentemo de pluraj falsaj reprezentantoj de la demokratio; sed en Hispanio, la tikla «detaleta» de tiuj kvincent mil bajonetoj estas atentinda obstaklo por la faŝista galopado. Plie, la sekvoj de la komploto ne statas plene kontentige, ĉar post la «pacifista» ebriego furiozis la antisemita diĥoĉo, kun akra impreso en la publika tutmonda opinio. Tial, nun la politika pozicio de Daladier k Chamberlain estas sufiĉe pli malfacila ol antaŭe. En Parizo, pli ol la sorto de Hispanio, suferis la kariero de du altrangaj aventuristoj. Efektive, nun, ili ambaŭ, perdinte la reputacion, celas nur savi sian haŭton. Kaptitaj en la maŝoj de privataj egoismoj; submetitaj al la interesoj de bankieraj rondoj; komanditaj de senskrupulaj mastroj de la granda industrio, ili komencas jam senti angorojn ĉe la spirado. Definitiva —nek provizoral— savo de la eŭropa krizo ne aperas, malgraŭ fortaj klopodoj de ĉiuj sorĉistoj de l' superkapitalismo. En Parizo do kunvenis du pereontaj figuroj; k ne ŝajnas fremda, al tia fatala perejo, nia brava rezistado. Estu tiu aserto, utila konsidero por tiuj, kiuj salutis la fuŝan rendezuon per tro gajaj espero aŭ tro alarmaj pensoj. Almenaŭ ni, tute trankvile k normale —batalante— observadis la maldelikatajn diplomatajn manovrojn, ĉar la efemeraj politikaj magnatoj, ĵus kunvenintaj en la belega liberala ĉefurbo de la lando de la gilofino, certe jam konsciis pri sia nekapableco—kial ne nomi ĝin: senpoveco?—apliki gravajn decidojn, koncerne la hispanan popolon, sen atento al la deziroj de tiu sama hispana popolo mem...

Ekster nia volo—forpeli la invadintojn, flegi la justecon, restarigi la nacian harmonion k rekonstruadi la landon, laŭ sistemo libere elektota per ĝenerala referendumo—ni akceptas nenion! Kaj farante tiel arogan manifeston ni fieras, kiel hispanoj, ke ĝuste nia lando, nia modesta honesta Respubliko—nek plorema nek fanfaronema—estas unika bastiono, ĝis hodiaŭ, kiu samtempe repuŝas stoike la soldatojn de Hitler-Mussolini k rifuzas senceremonie la friponajn projektojn de Daladier-Chamberlain.

Mankas papero, k tamen abundas recenziĝantaj aferoj, noblaj k abomenaj, en la leko de niaj kritikoj. Iomete senorde, ni prezentas kelkajn el ili, laŭ improvizita revuo, por ĉi tiu fenestro de la unua paĝo. Ien do la nova prezentado:

En la kadro de Novembro pompas la nomo de Madrido, aroganta ĉefurbo de la tutmonda antifaŝismo, nevenkebla citadelo. Kiu laŭlonge de du jaroj peza ĉeno el septcent tridek tagoj!—defendas sin kontraŭ sovaĝaj hordoj, kiuj jam forgesis la facilajn revojn pri ĝia rapida posedo. Madrido ankoraŭ estas Madrido! Bomboj k obusoj deŝegnas sur ĉielo girlandojn por ĝia gloro, disdonebla nur inter tiuj, kiuj gajnis tian honoron per la kara prezo de sia vivo: Unuaj internaciuloj, anonimaj popolfroantoj, sindonemaj milicanoj, sub rigora patra komando de Durruti, la severa anarkisto...

En kontrasto kun la tre helaj lumoj de Hispanio, floras lumaj flamoj en la bruna Germanio, pro brulantaj sinagogoj. Barbara spektaklo: drastej torĉoj luebre iluminante la revenon de nova malnova mezepoko. Aŭtodaŭtoj al libroj, ekzekutado per hakilo, amasa forbuĉado al judoj, doloro en furoro, teroro, angoro... La klera Germanio, de filozofoj k inventistoj, transformiĝis en frenezulejo, kie la plej danĝeraj frenezuloj estas la direktoroj mem. Tie cindriĝas sinagogoj k ŝlosiĝas sakristioj. Kaj ankoraŭ, post tio, ekzistas religiemaj personoj koketeemaj kun la faŝismo je nomo de la socia ordo, fia ordo kiu bombardas katolikajn katedralojn k murdas arĵajn infanojn en Hispanio, samtempe ol en Hitlerio ĝi masakras la idojn k idetojn de Izrael, profanante iliajn preĝejojn, detruante iliajn pacaĵn hejmojn, ŝtelante iliajn modestajn privatajn havaĵojn...

La lukto kontraŭ la faŝismo ne estas afero nur por antifaŝistoj! Tio estas urĝa bezono por ĉiuj homoj kun normala cerbo k sentema koro. Laŭ tia konvinko, la hispanoj kunpremas dentojn k persiste batalegas atendantie la vekiĝon, el narkotika dormo, de ĉiuj honestaj popoloj, kiuj erare fidis—ĝis la ekstrema rando de la nunjara tragika Novembro—je la radikaleco de Daladier, je la honoro de Chamberlain aŭ je la socialismo de Spaak, sen forgeso pri la judeco de du influaj politikaj milionuloj: Samuel Hoare, konservativa ministro de la Brita Imperio, k Leo Blum, aŭtoro de la Ne-Interveno.

En la kadro de Novembro, pompas la nomo de Madrido; jes! sed paralele ankaŭ ĉagrenegas la justeco, ĉar en Oriento falis Kantono k Hankeo; dum en Centra Eŭropo daŭras la festeno de politikaj vulturoj formangante pecojn el Ĉeĥoslovakio.

Brulas temploj, veas viktimoj, mizere forkuras amasoj sen patrio, rikanas satrapoj, komplotas perfiduloj, neŭtralas filistroj k... rapide ni tiras la kurtenon, en nia prezentado, ĉar subite ni ekmemoras, ke ankaŭ en Novembro, antaŭ dudek jaroj, oni deklaris solene, ke jam venis fino de ĉia militado...

Kolerio ne donas inspiron al registaroj!

Hispanio neniel suferas por vekoj kompaton, sed ja por neniam senti honton je sia konduto!

REVUO

Sageto kun Malico

La hispanaj socialistoj jam preskaŭ atingas la kulminon de sia mirkapablo, observante la sintenon, pri la hispana afero, de kelkaj internaciaj socialistaj gvidantoj. En Belgio precipe aperas la plej siranga—por ne diri abomena!—konduito de kelkaj, tiel nomataj socialistoj, kiuj celas hipokrite favori la planojn de Mussolini en Hispanio. La tiea ĉefministro kiel ministro por Eksteraj Aferoj k-do (!?) Spaak sugestis unue, kiel rekte proponis poste, sendi belgan ambasadoron, tre diskrete maskita sub nomo de komerca agento, al la faŝista Hispanio. Feliĉe, en Belgio, ankoraŭ ekzistas veraj socialistoj, veraj amikoj de la popolo, kun Vandervelde ĉe fronto, kiuj forŝiris la perfidan reton aŭ naŭzan intrigon kiel defendante nin, ili defendis samtempe la honoron de ĉiuj, kiuj suferis kiel mortis, laŭlonge de la Historio, por la Socialismo.

Tute prave, kun dolora honto, povis aperi en la centra organo de la Hispana Socialista Laborista Partio, ĵus jubileinta sian kvindekjarecon, interesa amara artikolo, kies lastan paragrafon ni tradukas laŭlitere kiel publikigas ĉi-sube:

BURĜA LABORISMO.

La homoj ne kongruas kun la nomoj. Multaj internaciaj gvidantoj estas nur brilaj figuroj, kiuj poluras la vanan retorikon de demagogiaj ŝablonoj, laŭ dekadenca stato de ilimopienaj sendangeruloj. Ili ŝajnigas, ke ili helpas nin, sed ili timas la malkomponigon de la putra grundo sur kiu ili vegetas: ili timas la forfalon de la kapitalista sistemo! Ili estas fidelaj aliancanoj kiel efikaj helpantoj de la burĝaj registaroj. Pli ol unu gvidanto subskribis jam, aniaŭ unu jaro kiel duono, la atestilon pri nia morto. Alia regalas nin per la Ne-Interveno. Ili sin nomas socialistoj kiel tamen, vivante kiel grandaj burĝoj, ili havas ankaŭ burĝaj la konceptojn...

El «La Socialisto» de Madrido kun dato 27. Oktobro 1938.

KONSTERNO EN LA BUFEDO

La faŝistoj konservas la klasajn privilegiojn eĉ en la tranĉeoj mem. En unu el la sektoroj najbaraj al Pozoblanko, niaj soldatoj ĵus konkeris pozicion, ĉe kies plej sekura ŝirmejo estis instalita iu tre bone provizumita bufedo. La epizodo, krom agrabla surprizo por la ekrovintoj, prezentas kuriozajn detalojn pri la komforto... por kelkaj personoj, en certaj faŝistaj frontoj.

Tie deforis taĉmento da riĉaj sinjoridoj, kiuj abunde ricevis de siaj familianoj kukojn kun nutraĵojn kun bareletoj da biero kiel boteloj da multekosta vino. Utiligante tiujn sendaĵojn, la burĝidoj aranĝis bufedon, por sia privata plezuro, dum la simplaj rekrutoj de la faŝista armeo, kun ĉiutaga salajro de 50 centimoj kiel malbona mango, devis kontentigi sin per kolera rigardado al la loga magazeno, envidante la bonan sorton de la popularmeanoj, kiuj perlaboras ĉiutage, tute akurate, 10 pesetojn.

La riĉula rondo, por distri siajn horojn je enuo, en tiu kvietara --kio pro tio mem elektita!-- sektoro, praktikis sur laŭga sendangera tereno diversajn sportojn kiel gimnastikojn. Tiamaniere, la ĝenerala tragedio estis por ili kvazaŭ agrabla ferio. Ili neniam atakis, ĉar por tiaj riskoj ja naskiĝis kiel venis la maŝroj aŭ la italaj «volontuloj» kun la kohorto da hispanaj sklavoj. Tamen, tio ne estis baro por flugigi la fantazion, korespondante kun historiaj faŝistaj fraŭlinoj, pri grandaj heroaĵoj, laŭ kiuj en la «rugaj» tranĉeoj ne restis, kiel specimeno, eĉ unu marksisto. (Laŭ la blufa propagando de faŝistoj, ĉiu, kiu ne ŝatas la despotismon estas marksisto!)

Dolĉa estis do la vivo, malgraŭ la milito, por tiu aristokrata socio, ĝis kiam la «mortinta» marksistoj subite revivigis kiel atakis ŝirme la sportemajn poziciojn de la sinjoridoj. De la analproksimaj rokoj, okupataj de la respublikanoj, venis muĝantaj obusoj, kiuj tro malgentile rompis la normalajn harmoniojn de la originala restoracio. Post la artillerio, intervenis la infanterio, kies unuaj patroloj, post unu horo, hisis triumfe la trikoloran flagon sur la malamikaj parapetoj inter la «klientoj» de la bufedo regis konsterno; tute malsama sento ekfloris ĉe la koro de la simplaj malfeliĉaj «faŝistaj» soldatoj, kiuj devigataj antaŭe estis nur rigardantoj de alies komforto, sidis nun amike, en la malpermesita zono, kie ili trinkis diligente kiel mangiis avide, kune kun siaj «malliberigantoj», multon el la abunda provizo de frandaĵoj kiel likvoroj, kiujn «romantikaj» faŝistinoj liveris por la vantaĵ sinjoridoj, sen plej eia supozo, ke iliaj donacoj povus esti iam regalo por la stomako de «iliaj» soldatoj, kiuj, por ĝui tiun ŝancon, bezonis fali kaptitaj en manojn de la «diabloj» --kio eĉ volonte batali apud ili-- por detruji la ofendajn privilegiojn de la feŭdaj kasto. pri kio estis pura spegulo tiu fama bufedo mem ĉe la fronto, kiun ĵus rekonkeris la Popola Armeo en iu sektoro tre najbara al Pozoblanko...

BUKEDO DA ADIAŬAJ SALUTOJ

AL NIAJ EKSTERLANDAJ VOLONTULOJ

En la emocia momento, kiam foriris la kuraĝaj eksterlandaj antifaŝistoj, konkurencis dorloti ilin ĉiuj organizoj, politikaj kiel sindikatoj. En specialaj kunvenoj, la amaso aprobis per tondraj aplaŭdoj la salutojn de lertaj oratoroj parolantaj sur tribunoj ornamitaj per la floroj plej belaj de la valenciaj ĝardenoj. Ni prezentas ĉi-sube bukedon da elektitaj fragmentoj el la diversaj paroladoj kiel manifestoj, kiujn oni faris omaĝe al la karaj samideaj malsamnacianoj, tre oferemaj amikoj, kiuj jam ne plu estas inter ni.

Ne malmultaj imperioj malaperis en la Historio. Sed ni ne malaperos, ĉar kiam iu etika impulso estas motoro, kiu puŝas antaŭen homojn kiel popolojn, oni povas suferi malsukcesojn sed oni neniel povas esti finvenkata.

Tial vi ĉiuj, veraj amikoj de Hispanio, devas havi fidon je ni. La vivo de viaj 5.000 mortintoj estas semo, kiu multobligos fekunde fruktojn de fervoro kiel neestingebla entuziasmo. La karno malkomponiĝas sed la ideoj postvivis; la organismo mortas, sed la sankta flamo de ĉiu nobla idealo rebrilos en la eterneco, se brulas volo por ekzisti. Kaj tiu brava volo ja regas en la hispana popolo, kiu tra la zigzagoj de multaj generacioj sciis trovi sin mem, post letargio plena de inkuboj. Pro tio, vi povas foriri trankvilaj, ho bonaj amikoj, ĉar tute sperte ni scias jam, ke ni povas jam plenumi nian devon!

Fragmento el diskurso de ĉefministro doktoro Negrin.

Vi estas plej bonaj amikoj, kiuj ne naskiĝinte en Hispanio, nuligas vian fremdecon por gajni nian fratecon. Gentila estas do via eksterlandaneco, kiu malaperas tra komunaj alsopiroj pri alta libereco. Samaj deziroj, saltante trans landlimojn, konfirmas la universalecon de niaj idealoj por ĉiuj konsciaj homoj. Ĝuste nun oni povas konstati, ke super la ideo pri patrio ekzistas la ideo pri justeco. Germanoj staris ĉi tie kontraŭ germanoj. Italoj kontraŭ italoj. Ili estis malamikoj, malgraŭ sia samnacieco, ĉar estis kontraŭa ilia koncepto pri justeco, kiel estis antagonismaj iliaj difinoj pri moralo...

El adiaŭa proklamo de la Socialista Partio.

Saluton, internaciaj kamaradoj! Ni adiaŭas vin kun ega malĝojo. Sciu, ke giganta aŭreolo akompanas vin: Ĝi estas nia kolektiva animo saturita de dolĉa kiel senmorta melankolio. Kvazaŭ antikvaj kavaliroj, vi venis amase, sindonemaj kiel fervoraj, por batali por nia afero, kiu ankaŭ estas via. Altan dankon ni gardas al vi, ĉar via gesto ne havas precedencan dum jarcentoj. Saluton, ho internaciaj kamaradoj. Sciu, ke via forveturo, ke tiu dekoracia Hispanio de toreadoroj kiel ciganinoj jam mortis, kiel mortos ankaŭ la malnobleco de Eŭropo, sur kies tomo blovos unu sola pasio: Via heroeco mirinda, antaŭ kio, tremas apoteoze la steloj kiel la dioj...

El adiaŭa oratora saluto de C. N. T.—F. A. I.

Por veni ĉi tien, kiel plenumi vian devon, homoj el diversaj progresemaj tendencoj, vi ne petis la permeson de burokratoj nek bezonis la pasporton de ŝtatestroj. Volonte vi venis kiel obeeme vi foriras; jen viaj plej altaj kvalitoj! La Popolfronton vi masonis ĉi tie per faktoj. Nun vi povas ankaŭ plenumi gravan taskon helpante fortigi la popolan unuecon tie, en viaj propraj landoj, kie tiom multe necesa estas ankoraŭ tiu laboro...

Paragrafo el saluto de la Komunista Partio.

La respublikanoj de Hispanio scias, ke multaj el vi aspiras al pli altaj politikaj ŝtupoj. Tial estas des pli dankinda via sindono ĉar vi, socialistoj, anarkistoj kiel komunistoj, ne havante la demokration kiel celon, defendis ĝin multe pli konkrete ol multaj pasivaj demokratoj. Ĝis revido, ĝis la venko, ĝis baldaŭ, karaj kamaradoj!

El manifesto de la Maldekstra Respublikana Partio.

ANKORAŬ RESUMETO PRI LA VOLONTULOJ

Nun, kiam jam foriris absolute ĉiuj niaj volontuloj, estas oportune montri kelkajn statistikojn pri ilia nacieco, kies unuaj vicoj, laŭ proporcio, estas jenaj:

Francoj.	29 %
Poloj.	9 %
Usonanoj.	8 %
Italaj.	7 %
Germanoj.	5 %

La ceteraj nacioj estis reprezentataj per pli malgrandaj procentaĵoj. Oni venis el ire malproksimaj landoj: Ĉinio, Abisenio, Aŭstralio, Nova Zelando k Senegalio: blankuloj, nigrujoj k flavuloj luktis k mortis frate unuigintaj. Tri fojojn oni devis reordigi la stabojn, ĉar tri sinsekvajn fojojn pereis ĉiuj iliaj konsistigantoj. Respondecaj membroj de laboristaj k demokratiaj partioj survestis la gloran kostumon de la Internaciaj Brigadoj. Pli ol 300 elstaraj regionaj gvidantoj militis, el kiuj 120 mortis defendante Madridon ĉe la Universitata Urbo. Venis 33 naciaj centraj gvidantoj, el kiuj ĵus forveturis nur 26, ĉar 7 mortis, ne ja kiel burokratoj.

Jen niaj kontoj, klaraj k sinceraj ili estas, kiel la pura celo de nia batalo. Kaj nun ni, la hispanaj respublikanoj solaj, jam sperte scias batali kontraŭ la regimentoj de la italaj aŭ germanaj invadintoj, dum triviale ankoraŭ marĉandas la abomena Komitato de la Ne-Interveno, pri la manko de pruvoj.

INTERNACIO DE NACIISTOJ

Konata estas la fervora labora sinteno, al nia liberiga lukto, de la dukino de Aĥoll (angla konservativa parlamentano). Ŝia homana spirito, ekster ĉia politika pasio, pelas ŝin preni partion por la popolo. Sub titolo «Lumigitoj sur Hispanio» ŝi verkis libron, kiu tre klare malkovras novajn aspektojn pri la rekta interveno de Italio k Germanio en la tiel nomata «fratmilito» de Hispanio. El tiu libro, nia estimata k-do J. Lezan el Pouy (Francio) tradukas k sendas al ni la fragmenton, kiu oni povas ĉi-sube legi k studi.

«Jes! Ni estas tre devigataj konstati tiun antaŭneviditan fakton: Pli efike ol la laboristoj, la famaj naciistoj — malamikegoj de ĉia internaciismo! — sukcesis paradokse starigi veran internacian ligon: Fronton de ekspluatantoj kontraŭ ekspluatatoj!

Laŭ tiu celo, la 31. Marto 1934, Mussolini k marŝalo Balbo akceptis la viziton de tri ĉefaj hispanaj rojalistoj. Post zorga ekzameno de la afero, Mussolini solene deklaris:

1) Mi estas preta helpi ĉiamaniere la malamikojn de la Respubliko por restarigi la monarkion en Hispanio.

2) Por pravi mian sincerecon, mi liveros tuj al vi 20.000 fusilojn, 20.000 manombojn k 200 maŝinpaŝilojn, krom unu miliono k duono da pesetoj, kiel tuja kapitalo.

3) Tiu helpo estos nur komenco. Mi kompletos ĝin sisteme k laŭbezono.

Dum la sama epoko, generalo Sanjurjo — cetera framasono! — pligrimis tra Hillerio. En Berlino li kontaktiĝis kun la hispana ataseo Martinez. Tiu vizito celis aĉeti aviadilojn. Du monatojn poste, oni retrovis en Berlino la saman generalon, akompanita de Goded, guberniesiro de Balearaj insuloj. Tiuj ĉi faktaj estas plensignifaj! Sed oni devas ne forgesi, ke du tagojn antaŭ la ribelado — 15. Julio — oni ordonis al 6 italaj aviadiloj ekforflugi al Cerdanjo k terenpreni en hispanan Marokon. Jam la 21. de sama monato, trupoj k municioj veturis aviadile el Maroko al Hispanio. Ok tagojn poste, germana aviadilo alteriĝis en Maroko. Secretaj agentoj estis senditaj al Romo k Berlino por helpon peti... Tiam, tiel frue jam, Hitler k Mussolini malkaŝe, cinike k abunde sendis militilojn k militistojn por dronigi en sangon tute senkulpan la hispanan demokration.»

MOZAIKO

● Rajmundo Franko, frato de la ĉefperfidulo, mortis en akcidento ĉe aviadilo. Li estis estro de la faŝista aera eskadro en Maljorko, de kiu flugas ĉiuj bombardaj aparatoj por semi la morton laŭlonge de la Mediteranea bordo. Ĉe la komenco de la Respubliko, li sin montris kiel revoluciulo, k poste li revenis al tio, kion ĉiam li ŝatis: la subpremon de la popolo! Per sama maniero jam mortis unue Sanjurjo, poste Mola k nun la dua Franko: se la kapitalismo estas ĉe de la flanko de la faŝistoj oni ne povas diri la samon pri la dia providenco...

● Nia armeo en fronto de Katalunio transpaŝis la rivereton Segre k endanĝerigis tre valorajn poziciojn faŝistajn, apud Fraga k Lerida. Ĉiuj penoj de la invadintoj, por regajni la perditan terenon, estis vanaj. En la fronto proksimaj al Valencio, niaj soldatoj entreprenis ofensivon kiu asekuras la defendon de la bela Mediteranea urbo. En la rivero Ebro, nia armeo retiriĝis al siaj malnovaj bonaj pozicioj.

● En la provinco de Almerio, la rikolto de vinbero atingis la gravan kvanton de 40 milionoj da kilogramoj. El ili oni eksportos eksterlanden proksimume 15 milionojn. La rikolto de orangoj en la Valenciana regiono ankau estas tre bona. Tiu rezulto montras la laboremon de la maljunaj kamparanoj, kiuj restintaj solaj en la vilaĝoj, malgraŭ la milito, neniel neglektas dorloti la teron, kiun ŝakale avidas la fremdaj invadintoj.

● Dum en la respublikana zono, la oficialaj ĉiutagaj informoj, pri la milito, reflektas ĉiam la veron: ĉu agrablaj ĉu malagrablaj; en la faŝista teritorio, spite al la blufado de *sinsekvaj k senhaltaj sukcesoj*, la mensogo estas ordinara oficiala normo en la informado. Kiam la *sukcesoj* haltas la trumpetoj mutas. Por pravigi tiun sintenon la faŝistaj radiostacioj dissendis antaŭnelonge jenan kuriozan

averton: «La koncizeco de la oficialaj informoj malebligas la bonajn patriotojn koni la sukcesojn de nia armeo.»

Kia informado, kiaj patriotoj!...

● La kardinalo Segura ĵus estas kondamnita al ekzilo, el la faŝista zono, pro parolado kiun li faris en Sevilio kontraŭ la germana paganismo. Oni diras, ke li faris tiajn deklarojn pro timo ke okazos, al la hispana katolika Eklezio, la samaj malagrablaj, kiuj okazas al ĝia religia fratano en la «nova» Aŭstrio.

● Okaze de la dua datreveno de la ekiro de la fama anarkista pioniro Durruti al la frontoj de Madrido, kie stare li mortis, la C. N. T. ricevis karesajn salutojn de ĉiuj organizoj, kiuj batalprete kunlaboras en la Popolfronto.

● Serafin Aliaga, elstara gvidanto de la hispana liberecana junularo, ĵus revenis el Ameriko, kie li faris grandan agitadon por nia afero, inter la popolaj amasoj. Lia voĉo de sincera anarkisto estis tie trafa atesto pri la lojala unueco reganta en la respublikana Hispanio, detruante kalumniojn k insidojn pri fantaziaj persekutoj.

● En Barcelono okazis impona plenkunsido de la tuta liberecana movado, kun entuziasma ĉeesto de la tri koncernaj branĉoj: C. N. T.—F. A. I. k Liberecanaj Junularoj. Partoprenis la debatojn multe da delegitoj, kiuj aprobis gravajn k trafajn rezoluciojn por doni efikon al la streĉa lukto kontraŭ la internacia faŝismo invadinta Hispanion. Oni ankaŭ plene aprobis la agadon de la ministro de Publika Instruado, reprezentanto de la C. N. T. en la registaro de la Respubliko.

● En la fronto de Katalunio, terenprenis itala trimotora aviadilo, kiu koliziis kun fosto. La aparato estas tre moderna k kunportas dek maŝinpaŝilojn k ĝia prezo egalas al kvin milionoj da frankoj. Ĉiuj ĝiaj ses aviadistoj estas italaj... kun permeso de la Ne-Interveno, kiu scias nenion.

DANKON, MULTAN DANKON!

Ne vane resonis mia voĉo tra la vicoj de nia tegamento. Centoj k centoj da belaj poŝtkartoj venas al miĝ manoj el ĉiuj anguloj de la mondo, kien nia heroldo flugas. Nia oficejo estas nun, pro tio, pilgrima punkto por multaj persejoj de la Hispanio, kiuj antaŭnelonge estis mokemaj skeptikuloj pri Esperanto: nia opinio ŝanĝiĝis! Mirige por ili, nia movado estas neniam fantazio sed ĉarma praktika reto, pri kies ekzisto atestas la amaso de arta materialo, kiu ĉiutage la hospitala poŝto fruktifordonas al mi. Miaj vortoj havas nun eskorton de tre loĝaj tentoj! La semo fruktigas, ĉar kelkaj soldatoj k vunditoj, kun ĝentila akompano de internaciaj flegistinoj, eklernas la lingvon eĉ ekverelante jam kun la akuzativo...

La abunda ricevo de tiom da ĝojaj simpatiesprimoj estas por mi kvazaŭ ĝuado de piej dolĉa frandaĵo. Ĉiuj oferoj, kiujn mi k ceteraj k-doĵ faras por daŭrigi la aperon de nia komuna interligito, ricevas valoregan rekompencan, per via tiel akurata atenco al mia peto. Dankon do, multajn dankojn, karegaj ĝemikoj, kiuj disigitaj tra la mondo, pro via esperantisteco, pli rekte ol aliaj, liveras refreŝigejn fortojn al mi, hispanaj popolfrontanoj, en nia kolosa ekĉerpiga batalo.

Kompreneble, respondi ĉiujn private estus afero neebla! Tamen, ĉiu speciala demando ricevos, unu post alia, rektan respondon, k ankaŭ en ĉi tiu numero, en aparta rubriko, mi aperigas la adresojn de tiuj, kiuj esprimis deziron korespondadi kun hispanoj. Kaj ĉiuj ceteraj, ne ricevante tiel rektan kvitancon, estu pardonemaj k bonvolu diveni mian emocion saluton tra la varma prozo de anonimaj artikoloj. Ankoraŭfoje dankon, multajn dankojn de via kamarada ĉefredaktoro.

LUIS HERNANDEZ. Oficinas Destacamento Sanidad, Hospital Militar. — Ordeniente (Valencio) Hispanio.

ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Gi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legataro. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

ĜENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono

GUSTAVE FARENC

55, Rue Brisc-Pain

Poŝtĉekkonto 13944 Orleans

ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO

nur por mono de holandanoj

PETRO van der PLANK

Van Speijkstraat, 48-1

poŝtĉiro 245542

AMSTERDAM W. Nederlando

BELGIO

K-DO M. DELFORGE

33, Rue de Meigne

Postĉiro 199106

CHARLEROI

ANGLIO

K-DO O. MELTON

23 Fowler Str. Nechells

BIRMINGHAM 7

SVEDIO

ARBETAR ESPERANTISTEN

Barnhusgatan B. o. g. n. o.

Postĉiro n 53411

STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)

POPOLFRONTA LETERUJO

J. Lezan. — Pouy. — Vian leteron kun verkaĵo ni ricevis k dankas, parlon de la verkaĵo ni publikigas. Ankaŭ ni ricevis la leteron, pro kies transsendo ni ankaŭ dankas. Saluton!

P. Doubek. — Buenos Aires. — Kun plezurino ni agas laŭ viaj instrukcioj, k notas vian adresosangon. Estonte ni esperas, ke vi ricevos la gazeton. Elkoran dankon pro viaj klopodoj por nia afero!

P. Lage. — Parnu. — Volonte ni plenumas vian deziron, pri la ne ricevo de la gazeto; ni ne scias la kaŭzon, ĉar ni regule sendas ĝin al vi. Bonvolu fari esploron!

C. J. Primo. — Zaandam. — Jes, la senditaj librotoj estas por disdoni senpage.

A. Krautzberger. — Eelbogen. — Nenium ekzempleron ni sendas al via lando, k ne scias kiu estas la sendanto de tiuj, kiujn vi ricevas. Ni supozas, ke se la nekonata kutima sendanto legas ĉi tion, ne plu sendos la gazeton al vi, laŭ via deziro.

Marcelo Martínez. — Base. n.º 6, Fronto. — Mono ricevita oportune. Dankon!

E. Aleksandro. — Blaine Lake. — Dankon por via letero k poemo, kiun ni publikigos.

B. Schouten. — Krimpen. — Ni dankas vian anoncitan mensendon k vian vortojn, kun kiuj ni plene konsentas. Cert, ke ni povos liberigi nian landon de la faŝismo, sed tre bedaŭre ankoraŭ restas tagoj de luktego.

INFORMEJO

K-do P. Dubois, Aliche, Francio, petas informojn pri k-do Manuel Sala, kies lasta

adreso estis 142 Brigada, 567 Batallon, Transmisiones, Base 8.º C. C. n.º 11.

K-do J. Nuesink, Narcissenweg 77, Beverwijk, Nederlando petas sciigojn pri k-do

W. P. J. Duijn, batalanto en Internacia Brigado k pri kiu deposit Aprilo, kiam li

estis vundita, nenion oni sciis. Lia lasta adreso estis Villa Pavlov, Benicassim.

K-do José Orpi Baldrís sciigas al siaj korespondantoj sian novan frontan adreson:

C. G. Sección 2.ª; 38 División, Base 3.ª, C. C. n.º 8.

John Fairchild (angla neesperantisto) Mankanta dum batalo ĉe Tortosa frue dum

Aprilo, S. R. L. 160, 57-a Bataliono, maŝin-pafilisto. La informo pri li estos danke mege ŝatata al ĉiuj ajn.

K-do Miguel Tarragó informas al siaj korespondantoj, ke pro sia konstanta translokigo, li starigis sian poŝtan adreson en la redakcio de ĉi tiu gazeto:

str. Mar 25, Valencia (Hispanio).

K-do Gaspar Vilar sciigas siajn korespondantojn pri la morto de lia sesjara fileto.

Li penas oportune skribi al ĉiuj amikoj.

KLARIGA AVIZETO

Denove, ni estas devigataj forpreni paĝojn al la gazeto. Nia provizo de papero eĉerpiĝas, k tio postulas rigoran administradon. Tial ni aperigas nur kvar paĝojn, ĝis kiam niaj aktivaj demarŝoj, por akiri ĉiel ain la necesan kvanton de papero, estu sukcesaj. Tiucele ni penas treege. Refoje, la elpruvita pacienco de niaj amikoj komprenos la pravon de nia decido, kiu garantias datran aperon, pli malpli amplekse sed ĉiam senlace de nia kara POPOLA FRONTO.

KORESPONDADO

Simple trilingua anonceto 4 f. fr.

HISPANIO. — Al ĉiuj, kiuj sendos al mi aviadilajn k novajn PM, uzitajn aŭ neuzitajn, laŭ ajna kvanto, mi sendos intersange kovertojn kun surgluitaj jubileaj PM samvalore, ne sendonte ilin en la koverto pro la nuna registara malpermeso eksporti PM. Adreso: Manuel Carreño, calle de José M.ª Orense, Barrio de la Amistad, 72, Valencia. Absoluta seriozezo.

Respondo tuja k rekomendita.

HISPANIO. — K-do Francisco Roglá, strato Salamanca 18, Valencia, dez. kor. kun tutmondaj gek-doĵ. Nepre li respondos.

SPECIALA KORESPONDADO

NUR POR HISPANOJ

NEDERLANDO

K-do J. Gelderman, Louise de Coligny-straat 1, Amsterdam.

K-do H. Quint, Pootstraat 15, Rotterdam.

K-do G. J. de Vos, Emmastraat 34, Zeist.

K-do E. J. Ommeren, Cornelisstraat 1, Haarlem.

K-do C. I. Prins, r/a Jonge Arnoldusstr. 39, Zaandam.

BRITIO

K-dino Kallino Turner, 60 Dundee Str.

K-dino Ellen Barr, Brown 91, Dundee Str.

Ambaŭ en Edinburgh.

K-do Robert Jameson, 7 Mickell Place, Musselbu.

K-dino E. L. Osmond, 95 Powlers Walk, London W. S.

SVEDIO

K-do Gustaf Nilsson, Slendgat. II Malmö.

K-do Elis Lövgren, Kungsgatan 12, Avesta.

FRANCIO

Laborista Esperantista Grupo, Rue Wil-

son 67, Somain (Nord).

K-do Francis Gué, Les Haies-Dammarie

sur Loing (Loiret).

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33; Valencia.

NIA MUNICIO

Valencia Esperantistaro.	24	pioj.
L. H. — Onteniente.	65	»
C. G. — Onteniente.	10	»
J. S. — Fronto.	5	»
B. L. — Almodóvar.	5	»
R. P. — Torrelló.	10	»
J. A. — Barcelono.	10	»
V. A. — Fronto	25	»
J. S. —	25	»
F. G. —	20	»
J. F. —	25	»
F. P. —	20	»
R. R. —	10	»
R. G. —	20	»
L. C. —	20	»
C. Ch. —	20	»
H. T. —	20	»
F. A. R. —	5	»
F. L. B. —	5	»
M. S. P. —	5	»
S. E. T. —	5	»
G. Latoro. —	50	»
J. B. — Cartagena.	5	»
L. C. — Baza	10	»
J. G. — Baza	10	»
R. A. — Almadén.	15	»
R. M. — Villanueva de la Jara.	5	»
F. M. — Fronto.	25	»
M. M. — Barcelono.	10	»
D. D. — Barcelono	25	»
F. M. — Barcelono	15	»
M. T. — Bazo 8.ª	25	»
F. G. — Bazo 3.ª	25	»
M. D. — Bazo 3.ª	5	»
S. M. G. — Bazo Turia.	10	»
B. L. — Villanueva de la Jara	10	»
A. P. R. — Bazo Turia.	3	»
Ch. P. C. —	3	»
U. C. — Fronto.	15	»
J. E. C. —	15	»
J. A. C. — Bazo Turia	15	»
F. U. F. — Bazo 1.ª	50	»
J. C. — Madrid.	5	»
B. S. — Callosa de Segura	5	»
J. M. —	10	»
J. M. B. —	20	»
J. T. — Valencia (haveno).	25	»
J. M. R. — Ciudad Real.	100	»
G. J. v. W. — Oedenrode N. B.	0'50	gd.
K. K. — Leeuwarden.	1	»
D. M. — Amsterdam W.	0'20	»
K. S. — Wormer.	0'50	»
G. J. W. — den Haag.	2'50	»
J. P. — Breezand.	10	»
B. S. — Krimpen a. d.	20	fr. bl.
D. H. — Halluin	10	ifr.
H. Y. — Marseille.	50	»
V. M. — Detroit.	110'45	»
A. A. — Syssleback, Svedio.	5'25	»
Y. — Uto Kumamoto.	8'75	»
H. J. — Montdevergues.	120	»
E. B. — Paris 17.ª	50	»
G. E. O. — Orleans.	10	»
F. G. — Dammarie sur L.	5	»
V. R. — Marseille.	20	»
W. Y. — Wellington, N. B.	2	ŝil.
J. H. T. —	2	»
G. B. —	2	»
D. K. —	2	»
A. V. —	2	»
P. O. — Paisley.	3	»
B. E. — Cardiff.	1	»
K-do B. — Manchester 16.	1	»
W. B. M. — Cowdenbeath.	2'6	»
D. s. — Paisley.	2'6	»
P. W. W. — Bishop, Aukland.	3'6	»
L. E. — Merthyr, Tydfil.	2	»
J. B. — London S. W. 17.	1	»
J. R. P. — Renfrew.	2'6	»
E. L. J. — London.	3	»
W. V. — York.	1	»
M. F. — London N. 19.	5	»
K-dino R. — Letchworth.	5	»

DANAJ KAJ NORVEGAJ AMIKOJ, ATENTU!

Bonvolu sendi viajn donacojn al

D. L. E. A. DANA LABORISTA ESPERANTO ASOCIO

KASSEREREN, AABIHOJ

Postkonto: 19906